# KOMUNIKOJ DE LA DIREKCIO

*Sub tiu titolo ni respondos la demandojn. kiuj ne necesigas leteron. Kiu deziros privatan respondon, tiu bonvolu skribi per poŝtkarto kun parto por respondo pagata.*

➣ S-o A. Barbot estas nur presisto kaj ne libristo. Tial oni sin turnu al li *nur* por l'abonoj. Ĉiuj ceteraj leteroj aŭ mendoj devas esti adresataj *rekte* al la Direktoro de E. K.

➣ **Ni petas la Direktoroj de Esperantaj gazetoj, ke ili ŝanĝu la malnovajn adresojn de E. K. kaj de ĝia Direktoro.**

# UNIVERSALA INFORMADO (U. I.)

*Anoncoj, komunikoj de U. I. estu sendataj, kun antaŭa pago, rekte al la Direktoro de la revuo.*

Abonintoj de E. K. povas komuniki al ceteraj legantoj ĉion, kion ili volas, pagante por unu vorto kvin centimojn. Vorto da pli ol dek literoj kostos duoble; — vorto da pli ol dekkvin literoj kostos trioble; vorto da pli ol dudek literoj ne estos akceptata.

**Loĝado en Francelando :** ➣ JUNULO estus akceptata kiel lernanto aŭ loĝanto en la domo de la Direktoro de E. K. Modera pago.

**Gazetoj :** ➣ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — Belgujo. 1 frank. — Unuiĝo poŝta: 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro: Xavier CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de « Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

➣ LE GLANEUR, Literatura, scienca, muzika kaj bibliografia. — Revuo monata. — Abonkosto : Belgujo : 2 fr. — Ekster Belg. 3 fr. — Administracio, redakcio kaj anoncoj : 406, rue Vanderkindere, Uccles (Bruxelles).

➣ GUIDA CARTOFILA ITALIANA, belega rev., interesega por kolektist. de poŝtk, de « ex-libris » kaj markoj datmemorigaj. Direkt. Grafo D. Cumbo, via S. Maria la Porta, 9; Messina. Abon. kun rajto por unu enpreso de koresp. 3 fr. en Itall. 4 fr. ekstere.

**Korespondado :** ➣ S-INO JANE PARIS, Les Hommeaux, Lion d'Angers, (M.-et-L.), dezir. korespondadi per ilustrit. poŝkartoj aŭ leter. kun ĉiuland. Esperantist.

**Kolektistoj :** ➣ S-o VARJU Endre, Budapest IV, Kygio U. 6. 2. em. 14 kolektas k. interŝanĝas uzitajn poŝtm.

➣ ESPERANTA-KARTOFILATELA KLUBO (E.K.K.), sola klubo kartof.esperant. Jara kotizaĵo : 2 fr. 50. Ĉiu aliĝanto ricevos la revuon: Le Carto-Philatélique Journal, oficiala organo de l'klubo. Direkcio 91, rue de Dunkerque, Paris.

➣ **Fotografaĵoj.** — S-o Jakobo Meazzini (vidu adreson en la nomaro de la Rajtigitoj) skribas al ni « En la venonta somero mi deziras presigi artikolon en la itala monata gazeto *Varietas*, kun la

ĉefaj ilustraĵoj de eminentuloj esperantistaj. Tial mi petas samideanojn, ke ili bonvolu sendi, por tiu dato, kelkajn belajn fotografaĵojn. »

➣ « **La Nova Rassegna** », monata revuo, eniras ĝian trian jaron. Ĝi ĉiam pli dikiĝas kaj aperas ĉiumonate pli interesa ne nur al italoj, sed plie al eksteritaloj. Estas tre gravaj la verkoj pri *Serbo-Kroata literaturo*. Krom tio ĝi publikigas artikolojn lituraturajn, artajn, kritikajn studojn, sciigojn historiajn, paĝojn de fremdaj literaturoj, k. c. kune kun bibliografio de novaj libroj. Kostas nur 6 fr. jare. La gazetoj esperantistaj ne faros ekŝanĝadi tiun revuon, kiu anoncos ilin. Direkcio kaj Administrac. : Via Ricasoli, 61-63, Firenze, (Itall.).

➣ **Tradukataj verkoj presotaj.** — « KRISTNASKA SONORADO » (Christmas Carol) de Charles Dickens, estas tradukata de nia amiko D-ro Martyn Westcott. — *Imitado de Jesuo Kristo*, esperantigita de A. Damevido, presiĝos kiam subskribantoj estos sufiĉe multaj.

**Londono :** ➣ PENSIO por gesinjoroj. Hejmaj konfortaĵoj, bano (varma kaj malvarma). Moderaj prezoj. Oni parolas kaj korespondas

*Sekvo p. V.*

# Societo Espero Katolika

CELO Disvastigi Esperanton en la mondo katolika; produkti, traduki, dissemadi katolikajn verkojn; organizi klubojn, kunvenojn, kursojn pri Esperanto, en la katolikaro.

KONDIĈOJ : Esti katolika; pagi jaran kotizajon minimume da 1 franko. (Ĉiu donacinta 100 fr. estos « Bonfaranto »).

SOCIETANOJ : Aprobantoj, Adeptoj, Fervoruloj, Elektistoj.

FAVOROJ SPECIALAJ AL ĈIUJ SOCIETANOJ ili ĝuos rabaton da 0 fr. 50 por aboni la Revuon, rabaton da 0 fr. 20 *por cent.*, por presigi komunikojn en *Universala Informado* ; rabaton da 0 fr. 50 por aboni *Oficejon de libraj informoj*.

KLUBOJ : Kiam estas almenaŭ *ses* anoj de S. E. K. en ia urbo, ili povas kuniĝi, elekti komitaton kaj peti aprobon de la Direktoro de S. E. K. Kluboj tre utilos : 1e por helpi klubanoj en akirado perfekta de la lingvo Esp. ; 2e por krei rilatojn inter diversnaciaj Kluboj aŭ Esperantistoj katolikaj ; 3e por kunlabori internacie pri socialaj, religiaj, literaturaj, artaj, komercaj aferoj, k. c. Por faciligi tiajn rilatojn tre gravas, ke ĉiu Societano konigu sian specialaĵon aŭ profesion. Ni do proponas krei jenajn Fakojn en S. E. K. I, Religio. II, Socialaj studoj. III, Literaturo. IV, Artoj. V, Komerco kaj Industrio. Aliaj Fakoj formiĝos laŭbezone. Ni do petegas tiujn, kiuj sendos aliĝon al S. E. K., klarigi samtempe en kia Fako ili deziras enskribiĝi. *Ni senpage publikigos unufoje plenan adreson kaj specialaĵon de la Societanoj.*

TRE GRAVAS POR NIA ENTREPRENO, KE ĈIUJ KATOLIKAJ ABONANTOJ DE E. K. ENSKRIBU SIN EN S. E. K.

# ESPERO KATOLIKA

**REVUO MONATA EN ESPERANTO**

« Unum ovile et unus pastor ». — (*Johan X. 16*).

« Unu ŝafaro kaj unu paŝtanto »

**Direktoro P-o Em. PELTIER — (PELTJE)**
**à Sainte-Radegonde près Tours (Indre-et-Loire) France**

**Abono jara :** En Franclando : 2 frankoj. Ekster — 2 fr. 50. | **Unu numero :** 0 fr. 30, afrankite.

**Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj : oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en augusto nek en septembro. Poŝtmarkoj ne estas akceptataj kiel abonpago.**

**Anoncoj.** — Tuta paĝo kostos 15 frankojn ; — duona paĝo 7 fr. 50 ; — 4na paĝo : 4 fr. ; 8na paĝo 2 fr. 50 ; 16na paĝo : 2 fr.

Por anoncoj ripetitaj, rabatoj por tri fojoj 10 %; — ses fojoj : 15 % ; — por 12 fojoj 20 %

**Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K.** estu sendataj nur al la Direktoro. — Manuskriptoj neniam estos resendataj.


## RAJTIGITOJ DE E. K.

ANGLOLANDO : S-o O'Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.
BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, 3, Place de l'Université, LOUVAIN.
ĈILILANDO S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI.
HUNGARLANDO S-o Endre Varjufalvy Varju, IV, Kigyo, U. 6, 2. em. 14 BUDAPESTO. —
ITALLANDO : S-o J. Meazzini, presso Franco Lucani, piazza G. Monaco 18, AREZZO.
HISPANLANDO S-o Ant Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.
RUSLANDO : Societo Espero Bol. Podjaĉeskaja, 24, log. 12.
HOLANDO : S-o S de Vries, Heerenstraat, 1, ROTTERDAM.
MEKSIKLANDO S-o Fernando Blanco, Pastro de Santa Rosa, NECOXTLA, (Estado de Veracruz).
BRAZILLANDO S-o José Felippe d'A Coutinho, en PATY. E. F. C. B. (Rio de Janeiro).
BULGARLANDO : S-o G. Oreŝkov, en PLOVDIV.
*Niaj Rajtigitoj povas varbi abonantojn kaj ricevi l'abonmonon.*


PRESEJO A. BARBOT
15, Rue Etienne-Pallu, 15
TOURS. (TUR') FRANCE

# EL LA MONDO KATOLIKA

**Romo.** — Pio X-a ordonis la presadon de nova katekismo. Tio estas la unua provo por forigi la diversecon de katekismoj. La nova eldono estas deviga ne nur por la roma eparkio, sed por la tuta roma provinco. Pio X-a esperas, ke la ceteraj eparkioj italaj uzos ĝin, kaj tiele estos nur unu katekismo por tuta Italujo. Ŝajnas, ke nia Sankta Patro deziras unuecon de katekismo almenaŭ en ĉiu nacio, en ĉiu lingvo. Li rifuzis aprobi francan tradukon faritan de itala eldonisto, kiu esperis vendadi *la sole aprobitan tradukon francan* !... La anglolingvanoj jam havas *unikan* katekismon. En Francujo ĉiu eparkio havas sian propran katekismon. Kiam familio transloĝadas en alian eparkion, la infanoj devas eklerni alian tekston katekisman tio estas granda malfacilaĵo por ili. Unueco estas tre dezirinda. Kio fariĝas en aliaj nacioj, mi nescias kaj petas bonvolajn korespondantojn skribi al mi pri tio.

La italaj katolikoj organiziĝas laŭ la reguloj liveritaj de Pio X-a, sub la direktado de S-oj Medolago Albani, Toniolo kaj Pericoli. Pli ol *du miloj* da italaj societoj akceptis la novan regularon. Ekzistas nun tri sekcioj *Ekonomia unuiĝo, Elektada unuiĝo.* kaj *Popola unuiĝo.* Obeante la Papon la Katolikoj italaj pli progresadis dum unu jaro, ol dum longaj jaroj de ŝanceliĝado kaj serĉado.

**Religia krizo en Fracujo :** La religia krizo en Francujo pli kaj pli akriĝas. Kiam oni legos tiujn liniojn, la jarcenta kontrakto inter Eklezio kaj Ŝtato estos rompita. La nova leĝo, laŭ kiu estos regulataj la rilatoj inter Eklezio Katolika kaj Respubliko, estas plena je maljusteco. Dum la granda revolucio de 1793, la nacio prenis la bienojn de l'Eklezio Katolika kaj promesis pagi pro tio pensiojn al ĉiuj pastroj. Nun *sen ia kompensado*, oni rifuzas pagi la pensiojn. Tio ja ne estas la pli grava afero. Se oni nur rifuzus protektadi Eklezion katolikan, kaj same ceterajn ekleziojn, lasante al ĉiuj plenan liberecon ekzercadi sian propran kulton, la katolikoj ne plendus. Eksperimento farita en Unuigitaj Ŝtatoj, kaj alie, pruvis, ke Eklezioj kaj Ŝtato bonege vivadas kaj progresadas sub tia regado. Sed la nova leĝo forĝas ĉenojn neakcepteblajn de la katolikoj.

Oni sendube tre miros, ĉe la ceteraj nacioj, pri la persekutada leĝaro de l'franca registaro! La Francoj faris revolucion por ĝuadi liberecon kaj nun oni *en Francujo* mortigas liberecon per leĝoj malliberemaj! Oni ĝenerale konsentas, en Francujo, ke la framasonoj estas la protagonistoj de l'persekutaj leĝoj. Oni ĉerpas pruvojn de tiu diro el la framasonaj gazetoj mem, kiuj raportas pri la *projektoj de leĝoj* preparitaj en la framasonaj kunvenoj, kaj voĉdonitaj en ili kiel *Deziroj*. Tiuj projektoj estas poste prezentitaj al la Parlamento ; kaj, — ĉu nur hazarde ? — la tekstoj leĝaj *mirinde similiĝas al la tekstoj framasonaj* ! kiam ili ne estas precize samaj.

Oni skribis al mi, ke la framasonoj eksterfrancaj ne agadas kontraŭ

religio ; ke E. K. ne devos ataki la framasonojn, se mi ne volos, ke ili ataku E. K. Mi bonvole konsentas, ĝis kontraŭa pruvo, ke ĉiuj framasonoj ne estas tiaj, kiaj la francaj. Sed ĉu katolikoj povas esti pacemaj kun tiuj, kiuj almenaŭ helpadas al la ruiniĝo de katolikismo, se ili ne ĝin ruinigas mem ? Ĉu homo, eĉ plej pacema, povas fratiĝi kun rabistoj, kiuj venas por ruinigi sian domon kaj forrabi sian monon ?

Se iu kredas, ke mi kalumnias la framasonojn francajn, mi konsilas al li la legadon de l'libro : *Kiel mi eniris en la framasonaron kaj kiel mi el ĝi eliris*, de S-o Copin-Albancelli; liberpensulo nekatoliko. sekve ne suspektinda.

**En Norvegujo, lando de libereco :** La trankvila revolucio, kiu fariĝis en Norvegujo interesas ĉiujn popolojn. Ĝi estas pruvo, ke ĉiu *revolucio* povus esti saĝa *evolucio*, kaj ne necese sangverŝiga batalado inter fratoj. Ni lasas la politikajn kaŭzojn de la Norvega evolucio por priskribi la liberecon, kiun ĝuas la katolikoj en tiu lando.

Norvegujo havas ŝtatan religion, Luteranismo. Tamen aliaj kultoj aprobitaj povas ekzerciĝadi en Norvegujo. Leĝoj tre justaj regas la « alireligiulojn » ; sed tiuj leĝoj celas garantii, ne etigi la liberecon.

La sistemo norvega tre similas al tiu de Ameriko. Kiam episkopo estas nomita, li informas la registaron pri sia elektiĝo. Sammaniere li agas, kiam li elektas kaj nomas parokestron. En Norvegujo la pastroj (el kia ajn religio) zorgas pri la civilaj registroj.

Kiel en Unuigitaj Ŝtatoj, ĉiuj societoj ĝuas civilan personecon ; nenia speciala permeso estas necesa por ke societo posedu bienojn. Sufiĉas, ke la estro de ĝia administracio estu norvegulo.

Sub tiu liberema regado, katolikismo tre progresadis, kaj Norvegujo neniel plendas pri tio, tial ke prosperado de katolikismo ne malhelpis ceterajn progresojn en tiu nacio. — La impostoj estas etigitaj por la familioj laŭ la nombro de l'infanoj. Ĉu multaj progresemaj nacioj tion faras ? — La virinoj povas voĉdoni kaj estas elekteblaj en la elektoj de l'komunumaj Konsilantaroj. Katolika virino esta « Konsilantino » en Kristiana

Kiam ŝia nomo estis proklamata, iu rimarkigis ; « Tiu sinjorino estas katolika. » — « Tio ne malhelpas ŝian elekteblecon, diris la Prezidanto, S-o Krogh Tonning. Mi ankaŭ estas katoliko ».

Ĉu popoloj, kiuj starigas sian leĝaron sur plena libereco de societiĝo, ne estas fortaj popoloj ? Ĉu popoloj, kiuj allasas plenan liberecon al Katolikismo, ne estas liberaj popoloj ?... Tion pripensu la francaj, kaj aliaj, leĝofaristoj !

**Papa Sendito en Japanujo :** Ĉefepiskopo O'Donnell, katolika ĉefepiskopo de Portland (Un.-Ŝt.), sendita de Papo en Japanujon por speciala komisiaĵo, dankegis Baronon Komura' pro tio, ke la Japanaj armeoj protektadis la katolikajn personojn kaj bienojn, dum la

milito. Barono Komura respondis, ke la konscienca libereco estas garantiita de l'Japana Konstitucio kaj ke ĝi estas fortike aprobita de l'Mikado: Japanujo estas ja pli antaŭen ol kelkaj Eŭropaj nacioj!

**Konscienca libereco en Ruslando :** La 18-an de oktobro, 1905 (rusa stilo) estos dato memorinda por ĉiuj Ruslandanoj. La lumo de libereco brilis tra tiu landego. Jen parto de l'imperiestra teksto, per kiu proklamiĝis Libereco :

« Ni donas al nia popolo la nedetrueblajn fundamentojn de civila libereco, apogita sur vera respekto de personoj ; la liberecon konsciencan, paroladan, kunvenan kaj societiĝan...

« Ni petas, ke ĉiuj fidelaj filoj de Ruslando memoru siajn devojn al la patrujo, kaj helpadu nin por ĉesigi grandegajn malkvietojn, por restarigi pacon sur nia naskiĝa lando ».

Ŝajnas, ke tiu ĉi alvoko ne estis aŭskultita. Bedaŭrinda, sangverŝiga revolucio ankoraŭ paralizas ĉiujn vivajn fortojn de l'granda rusa popolo. Ĝi devus kompreni, ke tiel profundaj riformoj ne povas realiĝi en kelkaj tagoj... Kiam kaj kiel finiĝos la revulucio ? — Neniu scias.

Em. PELTIER.

Noto. — Mi plezure ricevos informojn (mallongajn) pri la religia movado ĉe la diversaj popoloj.

---

# ATENTE LEGU KAJ PRIPENSU !

**Mi vere hontas prezenti al miaj legantoj tiel malgrandan, mizerulan, revueton... Jen kelkaj linioj de letero de Pastro A. Dombrovski, nia plej malnova kaj sindonema kunlaboranto. Liaj konsiloj estas ĉiam tre gravaj kaj tre atentindaj :**

« Tre estimata kunfrato. — Mi recevis la n-on 21-an de E. K. Ĝi estas vera *testimonium paupertatis* (atesto pri malriĉeco !)... Vi revas pri « revuo granda centpaĝa monate »... Via revo estas ankaŭ mia revo. Sed kiel ĝin efektivigi ? Vi varmege rekomendis la propagandon. Vi estas prava. Sed kiel propagandi tiel malgrandan folieton, kiel nia E. K. ? Se iafoje eliros nia organo en kajero 64-paĝa, kiel *Espero Pacifista*, tiam ĉiu povos montradi al siaj konatuloj tiun ĉi ĵurnalon dirante : abonu ĝin, vi vidas, ke ĝi estas plenhava, havas belan eksteraĵon, ĝi priparolas tre gravajn demandojn teologiajn, filozofiajn, psikologiajn kaj socialajn ; ĝi ne estas ludilo, k. t. p. Kaj mi esperas, ke per unu kajero 64-paĝa oni povus en unu monato varbi pli da abonantoj, ol per n-o 21 daŭre la tuta jaro.

« Tial mia konsilo estas jena Volu altigi la jaran abonpagon ĝis 5 frankoj... »

Vi komprenas, karaj legantoj, ke mi ne povas preni mem tian decidon. La revuo estas *via* tiom, kiom *mia*. — *Nune*, pro miaj personaj devoj

kaj laboroj, mi ne povus preni sur min la ŝarĝon de 64-paĝa revuo Sed mi pensas, ke mi povus zorgi pri 32-paĝa gazeto, laŭ la programo priskribita en n-o 21-a de E. K., kaj resumita en la letero de nia eminenta kunlaboranto.

**Mi do proponas altigi la jaran abonprezon ĝis 4 frankoj, por eldoni revuon da 32 paĝojn, kaj mi petas, ke ĉiuj legantoj de E. K. voĉdonu pri tio per poŝtkarto, kiel eble plej frue.**

La Direktoro de E. K.

MONOFEROJ POR ESPERO KATOLIKA

**Dua nomaro** ; S-oj Lefebvre (r. Stephenson, Paris) 2 fr. — Noël (Nancy) 8 fr. — Jadeau (Mercurey) 5 fr. — Maurice Lefèvre (Elbeuf) 5 fr. — Anonima donacanto 20 fr. — F-ino Roux (Saumur) 4 fr. — S-oj M. Madon (Tours) 3 fr. — Letenneur (Paris 8 fr. — F-ino d'Estampes (Pau) 50 fr. — S-oj Parenty (Audinghen) 1 fr. 50. — Mattelaer (Loveno, Belgl.) 5 fr. — Wemaes (Loveno) 5 fr. — Buret (Sainville) 3 fr. — J. Mistler (St-Claude) 0 fr. 50. — Seignemorte (Flamerans) 1 fr. — Sumo : 121 fr.

Unua donacaro, publikigita en n-o 20 de E. K. 192 fr. 50.

Tuta donacaro : 192 fr. 50 + 121, = 313 fr. 50.

Restanta ŝuldo : 700 fr. — 313, 50 = 386, 50.

Ni esprimas al ĉiuj donacintoj nian tre sinceran dankon. Nia ŝuldo estas ankoraŭ granda. Ni dankeme ricevos eĉ plej malgrandajn sumetojn. « La riveretoj formas riveregojn », diras franca proverbe. Ni aldonas « Riveregoj formas oceanon » !...

---

# REVUO DE L'ESPERANTISTAJ REVUOJ

LINGVO INTERNACIA (1 okt.) Paul BLAISE promenigas la leganton *Tra Belgujo*. — I. Malfeliĉulo rakontas kion la rusa popolo kredas pri *La sonoro de la preĝejsonoriloj*. — L. E. Meier esperantigis artikolon plej interesan de Fr. Hoffman pri "Jakob Grimm kiel probatalinto de la mondlingva ideo, — eraro.". — Pri subjunktivo" R. Deshays donas legindajn klarigojn, kaj la redakcio de L. I. memorigas paragrafojn 162, 163, kaj 218 de l'nesufiĉe konata verko : *Esperanta Sintakso*, de P. Fruictier.

(15 okt.)— Ĉefartikolo de Gab. Chavet pri "Urbo Firenzo dum la XV-a jarcento".—"Tiuj artistoj de la XV-a jarcento estis ĉiuj interesaj homoj ; malriĉaj, modestaj, simplaj, bonhumoraj, ili tute ne estis distingeblaj de la ordinaraj laboristoj. Filoj de popolaj gepatroj ili nur sciis legi, skribi kaj kalkuli, laboras por vivi, kaj estas konsiderataj de la altranguloj kiel simplaj servistoj ; ili havas karakterojn strangajn, malatentajn. Ghiberti forgesis sian propran aĝon ; Signo-

relli pentras senĉagrene la malvivan korpon de sia filo ; Manni Grosso antaŭ ol morti, rifuzas la krucifikson kiun oni alportas al li por ke li ĝin kisu, kaj volas nur kisi belan krucifikson, unu de Donatello. Por konservi varmon ĉe siaj piedoj, Lucca della Robbia enmetas ilin, dum la nokto, en amaso da rabotaĵo ; Donatello konservas sian monon en korbeto alkroĉita al trabo ! Ili amas ŝercojn... »

— Samideano parolas pri « la neceso de du novaj propozicioj. » Ni reparolos pri tio, ĉar aliaj gazetoj pritraktis la demandon.

SCIENCA REVUO (Okt.). En artikolo pri "Nietzche kaj Nietzscheismo", de P-ro Dobrohotov, trad. de N.Kabanov, oni legas : " La filozofio de Nietzsche estas la filozofio malnova kaj reakcia. Tiu ĉi kantisto de bestosimila superhomo, de milito kaj forto, de egoismo kaj besta flanko de vivo kunigis en si ĉiujn arajn antaŭjuĝojn de feodala Germanujo de XIX-a jarcento, ĉiujn ideojn de raso kaj potencanta mezo. La bono estas malbono, la vero estas malvero, la moraleco estas senmoraleco. Ĉio do konfesita kiel malbona, estas bona... En kio do konsistas la kaŭzo de grandega intereso kaj de frapeganta sukceso de tiu ĉi filozofio ? En klare esprimita kaj poezigita individualismo, kiun, kiel filozofian sistemon, Nietzsche kontraŭstarigas al kolektivismo,— tia instruo, sur kiun metas siajn esperojn en estanto kaj estonto la malestimata de li "fabriko komercaĵa de l'naturo",— la laborista amaso. — Ankaŭ leginda : " La formiĝo de valoj ĉe Alpoj Savujaj", de J. Reville, trad. de D-ro Vallienne.

ESPERO PACIFISTA (sept),— Ĉefartikolo "Pretendataj bonfaroj de rusajapana milito," de Charles Richet. Refutas S-on L. Dumur, kiu supozas ke, "se arbitracia kortumo estus ekzistinta, ĝi estus respondinta : Manĉurio devas aparteni al Ĥinujo, kaj Koreujo al Koreoj.» L. Dumur opinias, ke tiu sentenco estus maljusta ĉar ĝi kondamnus Japanojn morti pro malsato en siaj insuloj !

S-o Richet respondas "Teorie tiu opinio estas simple la justigo de la forto kontraŭ la juro. Se via najbaro, kiu havas ses infanoj estas tre ĝenata en sia malgranda loĝejo, li havas nenian rajton por veni ĉe vin, kun bastonego, por vin forpeli. Se la Belgoj opinias, ke ili estas tre multaj en tro malgranda lando, tio ne donas al ili rajton ekokupi Svedujon, tial ke tie la loĝantaro estas proporcie malpli multa.

« Esti ĝenata pro la tro granda nombro de loĝantoj justigas nenian malrespekton de justeco. Antaŭ la rajtoj de la Japanoj, ekzistas rajtoj de la Koreoj, kaj la arbitracia juĝistaro ekzistas por limigi la rajtojn de ĉiu.» Tre prava argumentado.

La enhavo de tiu 150-paĝa revuo estas leginda. Mi nur iom miras ke oni parolas pri « Internacia Kongreso de la Libera Penso, en Parizo, »kiel pri serioza Kongreso. Ĉiuj scias, ke la dirita Kongreso estis komedieto ne tute pacifista en kiu la liberpensuloj multe inter-

bataladis. Estus pli bone lasi en ia ombro kaj silento la « laborojn » de tia kongreso.

TRA LA MONDO (okt.). — Ĉefartikolo « Malantaŭen rigardo al la rusa-japana milito, » de A. Montrosier, kun dekkvinon da ilustraĵoj belegaj ; leteroj nepresitaj de generalo Livitskij (Manĉurio). Poŝtnikov (Siberujo), Klimov kaj Porfirjev (Rusujo). Interesega. Troviĝas en sama n-o Kroniko Esperantista ; La brava hundo Shippeitaro, japana rakonto (de D-ro Gambier) ; la « Rememoroj » de Kazi Girej (Manĉurio).

L'ESPERANTISTE (okt.). — Kelkaj rimarkoj pri la elparolado (por francoj). Plena teksto de la Parolado de D-ro Zamenhof al la Kongreso Esp.-Ni sendas nian plej sinceran dankon al *L'Esperantiste* pro la simpatia raporto de l'kroniskisto pri E. K.. Li diras : « Ni tre deziras, ke la petega alvoko de tiu fervora kaj senlaca pioniro estu aŭdita kaj ke oni donu al li la monan rimedon por daŭrigi sian taskon. La nekatolikoj povas senlime deziri lian sukceson, ĉar Pastro Peltier vidigas sin tute ne kiel netoleremulo aŭ fanatikulo, sed kiel grandakora, homama kaj lerta esperantisto. » Poste li represas la toaston de l'Direktoro de E. K, publikigitan en la n-o 20-a de la revuo.

NOTO. — Ni bedaŭras, ke ni ne povas raporti, en tiu ĉi numero, pri la nacilingvaj revuoj Esperantistaj. Loko mankas..

---

## NOTETOJ

PREĜARO. — Proksimume 145 ekzempleroj estas ĝis nun petitaj de subskribantoj. La kosto de l'presado devigas nin atendi ĝis kiam ni havos almenaŭ 250 subskribaĵojn. Ni nepre nevolas riski novan ŝuldon. Tuj kiam la nombro de l'subskribantoj estos sufiĉa, ni donos al la presisto la manuskripton de l'unua kajero, kies enhavo estos Ĉiutagaj Preĝoj ; Preĝoj por konfeso kaj komuniiĝo ; Preĝoj dum meso kantata kaj dum meso nekantata ; Edziĝa meso ; Meso por funebroj ; Vesproj kaj Kompletorioj ; Beno de l'Sankta Sakramento. — La latina teksto troviĝos apud la esperanta.

AL NIAJ MALNOVAJ ABONANTOJ. — Multaj el niaj malnovaj abonantoj jam sendis al ni sian abonpagon ni tre dankas ilin pro tio. Ili ricevis aŭ ricevos kvitancon enmetitan en la revuo. Sed multaj ankoraŭ ne pagis sian abonon por la 3-a jaro. NI DENOVE PETEGAS, KE ILI TION FARU KIEL EBLE PLEJ FRUE.

# LA UNUA LEGOLIBRO
## KATO KUN BOTOJ, ILUSTRITA

Libreto utilega por *eklernantoj*, tial ke la sufiksoj kaj finiĝoj de l'vortoj estas disigitaj per signetoj, por ke oni rekonu la radikvortojn.

Kosto 0 fr. 50, afrankite. Aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K.

Specialaj kondiĉoj por almenaŭ *dek* ekzempleroj kune mendataj.

---

## LINGVO INTERNACIA
## ESTAS NUN DUONMONATA

Enhavas 24 paĝojn. Sen literatura aldono 5 fr. — kun literatura aldono : 7 fr. 50. Adreso nova : Presejo Esperantista, 33, rue Lacépède. Paris, 5e.

---

➳ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura — BELGUJO 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro- Fondatoro XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de « Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

---

KOLEKTISTOJ S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, kygio U- E. 62. em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

---

LONDONO ; PENSIO por gesinjoroj. Moderaj prezoj. Oni parolas k. korespondas Esperante, Angle kaj France. — S-ino O'Connor, Esperanto House ; 17, St-Stephen's Square ; London-Bayswater.

---

# PREMIO AL NIAJ LEGANTOJ
**Novaj Fonografoj**

**kun DISKOJ " ODÉON "**

Du muzikaj pecoj sur ĉia disko (unu sur ĉia flanko) ; la diskoj « ODÉON » estas la plej bonaj
1-e, pro ĝiaj plej harmoniaj sonoj ;
2-e, pro la malmolecego de l' materialo, kiu preskaŭ tute forigas la bruon de l' maŝinaro, kaj plilongigas la daŭron de la diskoj.
3-e, pro la supraĵo tute glata, kiu forigas la kavaĵojn kaj difektojn.

**Prezo de la Fonografoj :** N-o 205 60 fr. — N-o 206 75 fr. — N-o 211 : 90 fr. — N-o 221 : 110 fr La maŝinoj diferencas per la longeco kaj larĝeco de l' pavilono.

**Prezo de la diskoj :** Grandaj diskoj : orkestraĵoj aŭ unuvoĉaj kantoj senparolaj : 7 fr. — Kantoj kun paroloj, deklamaĵoj : 7 fr. 25 c.
Malgrandaj diskoj orkestraĵoj aŭ kantoj senparolaj, 3 fr. 50. Kantoj kun paroloj aŭ deklamaĵoj, 3 fr. 75.
Por pliaj informoj, sendu poŝtkarton, kun pagata respondo, al la Direktoro de E. K.

**Se vi volas helpi nian revuon, aĉetu de ni Fonografon kun diskoj Odeon.**


---

Presejo A. BARBOT, Tours. *Le Directeur-Gérant :* EM. PELTIER.

Esperante, Angle kaj France. Sinjorino O'CONNOR. Esperanto House. St. Stephen's Sq^r, Bayswater, 17.

➳ ESPERANTA LIGILO, revuo por Blind., eliros en 1905 ĉiudumonate (6 numer. jare). Abono : 3 fr. Oficejo : 12, rue Soufflot, Paris. Direktoro : S-o Th. Cart. Oni abonas ankaŭ ĉe nia « Oficejo de Libraj Informoj ». — La 4 n-oj de jaro 1904 estas nune aĉeteblaj.

**Vojaĝoj** : ➳ S-o CASIER, 83, boulevard Anspach 83, Bruxelles (Bourse). — Téléphone 45-50. — Biletoj rektaj aŭ rondiraj kun rabato. — Ekskursoj sen aŭ kun konduktoro kosto laŭ reciproka konsento. — Speciala kaj agrabla sistemo por edziĝaj aŭ familiaj vojaĝoj.

# LIBROJ KAJ GAZETOJ RICEVITAJ

PROTECTION DE LA JEUNE FILLE (Protektado de la Junulinoj) dec. — Raporto de la Nice'a komitato. — Parolado kontraŭ la « Traite des blanches » (malbonmora ia komerco pri junulinoj).

BULLETIN DES STENOGRAPHES ET ESPERANTISTES GAPENÇAIS. — Dec. Anoncas esperante la Kongreson esper.

AKADEMI INTERNASIONAL DE LINGU UNIVERSAL. Cirkulero pri « Idiom Neutral. » Enhavas interesan proponadon pri radikoj de geografiaj nomoj.

ANNALES DE NOTRE-DAME DU LAUS (Hautes-Alpes). Jan. Organo de l'pilgrimo. Jare : 3 fr. Gap.

WOOMANHOOD, revuo pri virinaj interesoj. Direktorino : Ada S. Ballin. Enhavas lecionon pri Esperanto, de S-o M. Westcott ; ankaŭ ŝakproblemojn.

ANTAŬEN ESPERANTISTOJ ! decembra numuro.

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ, de François COPPÉE, esperantigita de Auguste Montrosier, Paris, Lemerre Kosto 75 centimoj; Ĉarmaj paĝoj de la franca Poeto. Belega eldonaĵo ; bonega Esperantigo.

REZISTECO DE LA FERKOLONOJ, de D-ro Frederico Villareal, Fakultatestro de Sciencoj, 70 paĝoj Esperante kaj Hispane. Enhavas skizon pri Esperanta gramatiko. Verko tre grava por la scienculoj.

MANUEL DE STÉNOGRAPHIE FRANÇAISE MODERNE, de G. Lebrun, kun kunlaborado de Alfred Lefebvre, 60 centim. Sistemo fondita sur fonetika klasigo de signoj.

TRAFENDITA TURO, Esperante verkita de Th. Cart, france kaj Esperante ; vendiĝas por la blinduloj 25 centim. Oni vidas ke l'aŭtoro scias nenur doni bonajn regulojn pri versfarado, sed ankaŭ bonege ilin uzadi.

DIE ENSTEHUNG DER ESPERANTO-SPRACHE, Presejo Moller kaj Borel. Berlino Germana eldono de la Letero de D-ro Zamenhof pri la deveno de Esperanto. Kosto 10 pfenigoj.

KATOLOGO DE LA ESPERANTISTAJ LIBROJ mendeblaj de la GRUPO ESPERANTISTA PARIZA, Prezo : 15 centim. En tiu libreto, kiel en L. 1., oni anoncas nia *Kato kun Botoj* traduko de Ch. Perrault ; ĝi estas traduko laŭ *Angla* rakonto.

LE COURRIER DES ALPES, (Gap) semajna ĵurnalo, enhavas artikolojn pri Esperanto.

Annales de philosophie chrétiennes (Analoj de Filozofio Kristana) Febr. Precipaj artikoloj Katolika mistikeco kaj l'animo de Dante (A. Leclerc). Homelio (speciala predikado) de S-a Klemento (J. Turmel). -Kial la studoj Biblio-kritikaj ne interrompiĝas (Ch. Denis). Kant'a revolucio (P-o Bernard).

Coin de terre et foyer (Terpeco kaj Hejmo) Febr. La tero kaj la tradicio (Odysse Richemont). Maŝtraja Lernejo en Annecy (S-ino Le Bourgeois). K. c.

Revue du clergé français (Revuo de Franca Paŝtraro) 15-an de feb. Historio de l'Eklezia ordonoj 1-a ordono (A. Villien). La haltigo de l'suno, de Josuo (A. Véronnet). K. c.

---

# OFICEJO DE LIBRAJ INFORMOJ

(O. L. I.)

Celo : 1e liveri informojn pri francaj kaj Esperantaj libroj aŭ gazetoj; 2e ricevi kaj plenumi mendojn pri libroj aŭ gazetoj.

Utilo Ĉiulandaj Esperantistoj povos per O. L. I. aĉeti librojn francajn aŭ esperantajn, aboni la gazetojn, kaj, antaŭ ol aĉeti libron, peti informojn pri ĝia kosto, enhavo, valoro. — Kiam ni havos Korespondantojn en ceteraj landoj, O. L. I. liveros informojn pri verkoj el kia ajn lando. Ni baldaŭ konigos landojn en kiuj ni havos Korespondantojn. *Ĉiu Esperantisto eĉ ne abóninto de E K. povas uzi O. L. I.*

Abono : Ĉar O. L. I. necesigos specialan Sekretarion kaj multe da klopodoj por kolekti utilajn informojn, ni estas devigataj postuli sumon da *5 frankoj* por abono jara. El tiu sumo 3 fr. pagos l'abonon, kaj 2 fr. pagos la elspezojn de korespondado. — Abonoj etsas akceptataj en kia ajn epoko, sed nur por unu jaro.

Neabonantoj povas uzi O. L. I. pagante 0 fr. 50 por ĉia mendo aŭ peto de informoj.

Ĉiu abono aŭ mendo estas antaŭe pagota. — Poŝtmarkoj (escepte francaj) ne estas akceptataj kiel pago.

Funkciado : Oni respondos plej rapide, kiel eble, al ĉiu mendo aŭ peto de informoj. Kiel eble la respondo fariĝos per poŝtkarto, — escepte se l'aboninto postulos leteron. Kiam estos konsumitaj la 2 frankoj provizitaj por la elspezoj de respondado, avizo estos sendata al l'aboninto kun la lasta respondo. Li tiam devos denove sendi 2 fr., se li deziros adi mendojn. — Se fine de l'jarabono restos ia sumeto, ĝi estos enkalkulata kaj forprenata de sekvanta abonpago. Se oni ne reabonos, la sumeto ne estos resendata, sed oni povos ĝin uzi por apartaj mendoj po 0 fr. 50, *dum unu monato post le fino de l'abono.*